

# KOMITATO JEAN PAIN



**(K.J.P.)**

ne-profitdona asocio  
ne-registara organizo

Demonstrado - Informado - Instruado

Centro de

Kompoŝtado

Plibonigo de la grundo

Traktado de organikaj defalaĵoj

# La metodoj Jean Pain

## Kompoŝtado de veproj kaj de ligneroj el tranĉitaj branĉoj

Fine de la sesdekaj jaroj, la Franco Jean Pain iniciatis metodojn por la reciklado de freŝe dehakitaj branĉoj kaj de veproj, en grandvaloran kompoŝton.

Laborante nur mane, oni uzas ekskluzive branĉetojn (diametro <0,8 cm). Kiam oni laboras pistomaŝine oni unue devas tranĉi la plej dikajn branĉojn. Oni sekve akvumas abunde la lignerojn antaŭ ol stakigi ilin.

Post naŭ monatoj kaj kelkaj returniĝoj, la ligneroj fariĝas kompoŝto kiu enhavas ĉiujn necesajn nutraĵojn.


Dank' al sia granda enteno je organikaĵoj, tiu kompoŝto taŭgas perfekte por plibonigi la grundon.

Jean Pain verkis libron pri siaj metodoj, kiu havas kiel titolon "La metodoj Jean Pain aŭ Alia Ĝardeno". En tiu ĉi libro, Jean Pain ne nur klarigas kiel produkti kaj uzadi veprokompoŝton, sed ankaŭ priskribas kiel ekstrakti biometanon kaj varmon el la kompoŝtstakoj.

La libro estis eldonita franclingve, germanlingve, anglalingve, nederlandlingve kaj hispanlingve. Mendo de tiu ĉi libro okazas per pago de 500 BEF je la bankkonto n° 438-0155011-22 de la Komitato Jean Pain.




## Alirplano



## Vizitcentro - Hof ter Winkelen

Mediaj konsilantoj, geinstruistoj, gehelpantoj al evolulandoj, kaj ĉiaj personoj koncernataj estas bonvenaj, individue aŭ grupe, en la vizitcentro "Hof ter Winkelen" okaze de la malfermataj pordoj (senpagaj) aŭ rendevue (pagaj).



Demonstrado kaj informo pri :

- la kompoŝtado de vepro
- la kompoŝtado hejme de organikaj defalaĵoj el la kuirejo kaj el la ĝardeno
- la vermobredado
- la uzado de kompoŝto en la ĝardeno
- la sveda kompoŝtnecesejo
- la etskala elpurigado de malklara akvo per lagunado

### Malfermataj pordoj:

Monate, ĉiun unuan sabaton, de la 10<sup>a</sup> ĝis la 12<sup>a</sup>, kaj de la 14<sup>a</sup> ĝis la 17<sup>a</sup> horo : gvidataj vizitoj, projekciado de filmoj kaj lumbildoj ; respondoj je specifaj informpetoj. La gvidataj vizitoj de la laborloko kaj de la ĝardenoj komenciĝas je la 10<sup>a</sup> kaj je la 14<sup>a</sup>.

Ili okazas anglalingve, en Esperanto, franclingve, nederlandlingve kaj germanlingve.

### Vizitcentro K.J.P.:

Hof ter Winkelen  
Holle Eikstraat 25  
1840 Londerzeel  
- BELGIË -  
Tel. kaj Faks (0)52/30.53.65



Aliro per aŭtovojo A12  
Bruselo-Boom-Antverpeno  
Eliro Londerzeel centro  
Sekvi la indiktabulojn  
"Kompoŝto Jean Pain"

## Agado favore al Tria Mondo

La problemoj rilataj al la defalaĵoj kaj al la malboniĝo de la grundoj estas ankoraŭ pli zorgigaj en Tria Mondo ol en la ege industriigitaj landoj.

La frakcio organika en la forĵetaĵoj tie estas tiom granda kiom en niaj landoj. Ĉar la organikaĵo multe pli rapide mineraliĝas en (sub) tropikaj grundoj, estas necese alporti organikan sterkon al ĝi ; tiel la strukturo de la grundo ne difektiĝas kaj la nutraĵoj, l'akvo kaj la grundofaŭno ne riskas perdiĝi.

Tion pravigas la demandoj ĉiam pli multaj al K.J.P. el evolulandoj kaj el organizoj zorgantaj pri ili por akiri **informojn, konsilojn aŭ instruadon.**

La K.J.P. kondukas kiel konsultodonisto favore al Tria Mondo kies reprezentantoj ĉiam estas bonvenaj en Londerzeel okaze de pordoj malfermataj aŭ rendevue. Tie ili ankaŭ povas konsulti la bibliotekon.



Laŭmende de l'Administracio ĝenerala por la Helpkontribuo favore al la Evolulandoj, de la Organizo por la Grundkulturo kaj por la Nutrado de la U.N.O., la K.J.P., ĉiujare organizas parte en Bruselo kaj parte en Londerzeel staĝojn por delegitoj el tropikaj kaj subtropikaj landoj.

Tiuj staĝoj daŭras unu aŭ plurajn semajnojn kaj enhavas unuflanke praktikan kaj teorian instruadon, kaj aliflanke programon de rondvizitadoj.

# Traktado komunumskale de verdaj defalaĵoj

La K.J.P. regule organizas seminariojn favore al interkomunumaj asocioj, al la komunumaj responduloj pri la protekto de la verdaj spacoj, al la ĝardenistoj zorgantaj pri la traktado de abundaj verdaj defalaĵoj el parkoj, el arbohavaĵoj, el ĝardenoj kaj el rubejoj.


Dum tiuj seminarioj, la sekvintaj temoj estas traktataj :

- antaŭforigo de la verdaj forĵetaĵoj
- surloka pistado de la verdaj ruboj
- uzado de la pistaĵo kiel pajlaĵo (sternaĵo) por kovri la grundon
- kompoŝt teknikoj de la verdaj forĵetaĵoj
- ekipado per maŝinoj
- kriterioj de la bonkvalito de kompoŝto kaj ĝia uzado

La K.J.P. agas kiel konsultodono pri ĉiuj tiuj temoj.

Laŭmende de OVAM (la Flandra paraŝtata organizo por la mastrumado de la forĵetaĵoj) la K.J.P. studis ankaŭ la problemon de la traktado de falĉita bermherbo, kaj verkis broŝuron pri tiu temo, eldonitan nederlandlingve de OVAM.

En aparta depresado de la revuo "Humus News" la K.J.P. eldonis gvidilon titolitan "Kompoŝtgvidilo por la komunumoj" (franclingve kaj nederlandlingve). Tiu ĉi gvidlibreto enhavas tekstojn pri la traktado de verdaj defalaĵoj, kaj ankaŭ utilajn adresojn. La gvidilo kostas 100 BEF aŭ 2,5 Eŭrojn (pago al Bankkonto 438-0155011-22, je nomo de la K.J.P.).




# Kampanjo por la kompoŝtado hejme

Forĵetaĵoj el niaj mastrumadoj enhavas 50% de organikaj substancoj. Eĉ se oni havas nur ĝardeneton, oni kapablas trakti si mem la forĵetaĵojn el la kuirejo kaj el la ĝardeno helpe de kompoŝtbarelo, de kompoŝtkuvo aŭ en stako. La kompoŝtado estas biologia procezo kiu kaŭzas nenian ĝenon (fiodoro aŭ fibestetoj) kiam oni estas aginta korekte.

En la demonstrejo de la K.J.P., la aspirantaj gekompoŝtistoj povas vidi, tuŝi kaj flari kompoŝton faritan en barelo ; ili ankaŭ lernas pri la vermobredado.

Favore al kandidatoj gvidkompoŝtistoj, al mediaj konsilantoj kaj al instruistoj, la K.J.P. organizas unutagajn kaj plurtagajn praktikajn kaj teoriajn kursojn.



Laŭmende de komunumoj kaj de asocioj scivolemaj pri la kompoŝtado hejme, prelegantoj de la K.J.P. povas detale klarigi la procezon.

Lernejoj plenumas gravan rolon dum kampanjoj por interesigi la loĝantaron al la kompoŝtado hejme. Por tiuj lernejoj la K.J.P. organizas mallongajn programojn (unu aŭ du horoj) pri :

- la kolektado de forĵetaĵoj mastrumadaj
- la bestetoj vivantaj en la grundo
- la instruado de vermobredado
- la kribrado kaj la uzado de kompoŝto.

La K.J.P. direktas sian atenton speciale al la gestudentoj de agrikulturaj kaj hortikulturaj lernejoj. Hodiaŭaj temoj, kiel la traktado de verdaj defalaĵoj, la uzado de kompoŝto, la pajlado de ligneroj estas ĉefe pritraktataj dum la vizito al Hof ter Winkelen.

Tiuj kiuj intencas redakti disertadon pri tiaj temoj ankaŭ estas bonvenaj por akiri informojn.

# "KOMITATO JEAN PAIN"

ne - profitdona asocio

Hof ter Winkelen – Holle Eikstraat 25

1840 Londerzeel – België

Tel. + Faks : +32 (0)52.30.53.65

Retpoŝto : comite.jean.pain@skynet.be

Bankkonto KB 438-0155011-22

Ne – profitdona asocio n° 7334

Ne – registara organizo : ministeria decido 10/02/81

ISSN Humus News 0773-0659

## Humus News

Ekde 1984 la K.J.P. publikigas la kvaronjaran revuon Humus News. Artikoloj verkitaj anglalingve, franclingve kaj nederlandlingve prezentas la plej freŝdatajn teknikajn progresojn pri la ellaborado kaj la uzado de kompoŝto en Belgio kaj alilande.

Pere de Humus News, komparaj eksperimentoj estas priskribitaj, lerntagoj estas sciigitaj, novaj maŝinoj kaj teknikoj estas prezentataj. Abono kostas 300 BEF (aŭ 7,5 Eŭrojn) jare por belgaj abonantoj, 10 Eŭrojn por eŭropaj landoj kaj 15 usonajn Dolarojn por aliaj landoj.

## Biblioteko

La K.J.P. disponas pri biblioteko enhavanta multajn librojn, protokolojn, revuojn, novaĵojn el la industria sektoro, filmojn, lumbildojn koncerne la produktadon kaj la uzadon de kompoŝto. Oni povas konsulti la bibliotekon.

## Apogo

Donacoj estas ĉiam bonvenaj sur la bankkonto de la K.J.P. Donacantoj fariĝas membroj apogantaj kaj helpas je la disvolviĝo de la vivrimedoj de la K.J.P. Belgaj anoj pro donacoj ekde 1000 frankoj belgaj ankaŭ ricevas senpage abonon je Humus News.

## Pordoj malfermataj

La vizitcentro estas monate alirebla ĉiun unuan sabaton (de la 10<sup>a</sup> ĝis la 12<sup>a</sup>, kaj de la 14<sup>a</sup> ĝis la 17<sup>a</sup> horo). Senpagaj gvidataj vizitoj nederlandlingve, franclingve, germanlingve, en Esperanto kaj anglalingve

**Tiu ĉi prospekto estas eldonita en 9 lingvoj : angla, Esperanto, franca, germana, hispana, itala, nederlanda, norvega, portugala.**

7/03/2000